# ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2020 / 2

Karaj kaj estimataj ĈEA-membroj kaj ceteraj geamikoj!

Post longa paŭzo kaj post por ni ĉiuj nefacila jaro mi aŭdiĝas al vi kun (en mia redakto supozeble la lasta) eldono de Retkomunikoj. Sekva informmaniero flanke de ĈEA estas kaj estos ankoraŭ pritraktita. Ĉiukaze gravas, ke malgraŭ pandemiaj limigoj kaj nuligoj de aranĝoj ESPERANTO DAŬRE VIVAS☺! El retaj novaĵoj ekde oktobro mi kolektis por vi sufiĉe abundan elekton por legado kaj spektado dum longaj vintraj vesperoj. Elkore, Pavla Dvořáková

## 1. LA RETEJO ESPERANTO.CZ DENOVE FUNKCIAS☺!

Tuj komence grava bona novaĵo! Nia retejo, en septembro atakita kaj grave damaĝita de piratoj, post tri monatoj denove preskaŭ komplete denove funkcias (nun ankaŭ la rubriko "Aktualaĵoj" - antaŭe ili ne povis aperi). Dankon al oferema klopodo de la retejdisponiganto Station.cz kaj ĝia intensa kunlaboro kun ni retejprizorganto Aleš Tomeček! Ni klopodos laŭeble baldaŭ uzi la oferton de la Nacia Biblioteko kopii kaj estonte ankaŭ oficiale arkivigi nian retejon.

## 2. TRI TRISTAJ FORPASANONCOJ

Antaŭ refunkciigo de la rubriko Aktuality ni publigis informon pri forpaso de tri gravaj kaj al ni karaj membroj de ĈEA. Nekrologoj en Esperanto aperos en Starto n-ro 4.

Josef Xaver Kobza (27.2.1921 - 7.11.2020) el Písek/Veselí nad Lužnicí (Esperante)
Vladislav Hasala (25.5.1951 - 25.11.2020) el Strážnice (Esperante)
Jarmila Rýznarová (13.12.1929 - 5.12.2020) el Pardubice (Esperante)
En la anoncoj vi trovos ankaŭ ligilon al sondosieroj.

## 3. 2020 - JARO DE VIRTUALAJ ARANĜOJ

Ĉio malbona kutime estas ankaŭ por io bona. Pro la kronviruso estis amase nuligitaj gravaj Esperanto-aranĝoj kaj estis necese trovi iun partan solvon. Venis stimulo al nia movado fine pli interesiĝi pri uzo de modernaj teknologioj por okazigo de virtualaj renkontiĝoj. Certe ili ne povas anstataŭi fizikajn personajn kontaktojn, tamen oni povas nun (plejparte senpage) kaj el komforto de sia hejmo partopreni valorajn programojn eksterlande. Fine komencis estis registrataj kaj publikigitaj valoraj programoj, kiuj antaŭe perdiĝadis en "nigran truon".

En la superrigardo **Internaciaj virtualaj aranĝoj ofertas por ĉiuj senpagajn videoprogramojn** (origine el 9.9., sed en decembro aktualigita) vi povas trovi ligilojn al registritaj elektitaj programoj de la virtuale okazintaj

- Virtuala Kongreso (anstataŭo de la Universala Kongreso en Montrealo) kaj MondFest' (entute KELKDEK videoj!)
- Somera Esperanto-Studado
- Landaj Kongresoj de Usono kaj Aŭstralio
- ILEI-Konferenco
- La 5-a Interlingvistika Simpozio en Poznano

**Komenco de virtualaj aranĝoj en Ĉeĥio**

Instigite de tio, Esperantista Klubo en Brno komencis pere de Skajpo pretigi interage siajn programojn en Facebook kaj la registritan programo disponigi en Youtube. La klubo en Prago komencis disponigi kelkajn videojn el siaj programoj en Facebook antaŭ unu jaro. La unua interaga kunveno en la platformo Zoom okazis 10.12.2020 kadre de la Kristnaska vespero.

Registritaj prelegoj en la jutuba videokanalo de la Esperantista Klubo en Brno

Milan Kolka - Ĉi-jara virtuala SES 19.9.
Miroslav Malovec - Asociaj ekzamenoj 6.10.
Oldřich Arnošt Fischer - Salmonelozoj 13.10.
Milan Kolka - **Kiel hejme registri prelegojn** 8.11.
Oldřich Arnošt Fischer - Alois Topič (1852–1927), la ĝardenisto, kiu ĉasis ornitorinĥojn 10.11.
**Novembro 1989 per niaj okuloj** klubanoj kaj iliaj gastoj rememoras - 24.11.
**Kiel ŝanĝiĝis niaj vivoj post Novembro 1989** 2.12.
Oldřich Arnošt Fischer - Rasputin 9.12.

La plej novaj spekteblaj programoj de la **klubo en Prago**
Tomáš Břicháček - Bultenoj de la jaro 2020 5.11.
Pavla Dvořáková - Surspure de doktoro Zamenhof en Bjalistoko 9.12.
La programoj estas publikaj, do povas ilin spekti ankaŭ tiuj, kiuj ne havas sian konton ĉe Facebook!

Pri la virtualaj programoj de la **klubo La Ponto Písek** el aprilo kaj majo 2020 vi jam estis informitaj. Daŭre vi bonvenas en ĝia jutuba videokanalo.

**VIRTUALAJ ARANĜOJ 15.12. OMAĜE AL ZAMENHOF-TAGO, KIUJN ANKAŬ VI POVAS REKTE PARTOPRENI!** (la indikita tempo estas en Ĉeĥio valida Mezeŭropa tempo UTC+1)

**Kiel mi fariĝis esperantisto** - organizas Esperantista Klubo en Brno ĉe sia Fejsbuka paĝo - 18.00-19.00

Zamenhof-Tago - Tago de Esperanto-Libro en Herzberg ĉe Zoom - 19:00-21:15

Kie ekscii pri aliaj virtualaj (kaj espereble esonte ankaŭ denoive fizikaj) aranĝoj?
En la retejo **EVENTASERVO.ORG**!

## 4. ZAMENHOF-TAGO LA 15-AN DE DECEMBRO

Krom la supre menciitaj virtualaj aranĝoj en Brno kaj eksterlande kaj krom la prezento
Surspure de doktoro Zamenhof en Bjalistoko
en nia retejo tute novas:

**La Dua suplemento al la Nova retligilaro pri doktoro Zamenhof** Esperanto.cz 15.12.2020
en kiu inter pli ol 50 novaĵoj (plejparte el 2015-2020) ni aparte atentigas vin ekz. pri:
- Zamenhofaj videomeditoj de Federico Gobbo
- artikolo de Carlo Minnaja pri Zamenhof kaj Masaryk
- la bildstria romano pri Zamenhof
- rara registraĵo de la prelego de Edmond Privat
- poemo "La Espero" en muzikigo de Manŭel Rovere

## 5. NOVAJ NUMEROJ DE GAZETOJ

"**Praga Bulteno**", redaktata de Tomáš Břicháček
n-ro 2 aperinta 8.10.  - "Malgraŭ la "dua ondo"L ni ne sidas hejme"
n-ro 3, aperinta 9.11. - dediĉita speciale al la projekto "Armena semajno"

"**Dio benu**", redaktata de Miloslav Šváček
en la  n-ro 4, aperinta en oktobro,  krom diversaj artikoloj entenas i.a. ankaŭ pensigajn eseetojn "Pri la decidado" kaj "La demandoj" de Max Kašparů
En la sekcia retejo senpage elŝuteblas ankaŭ leginda romano de Sergej Dakov "Pardonu, Nataŝa" en la traduko de M. Šváček pri persekutado de kristanoj en Sovetunio.

## 6. REMEMORE PRI KOMENIO (omaĝe 350-a datreveno de lia forpaso)

albumo Komenio en la muzea paĝo ĉe Ipernity
tekstoj, fotaĵoj  + tekstoj kaj sonregistraĵoj  (Vojo al lumo  kaj  Rebonigo de la homaj aferoj)

Ekspozicio pri Komenio en Romo  - sonartikolo de Jarka Malá por la Esperanta Retradio, 23.10.

## 7. MENCIINDAJ ARTIKOLOJ

Génius z Přibyslavi: v devíti uměl cizí jazyk, v osmnácti už vydal slovník *(Genio el Přibyslav: kiel naŭjara li scipovis fremdan lingvon, kiel 18-jara jam eldonis vortaron)* - artikolo pri elstara esperantisto, vortaristo kaj pastro Jan Filip en la ĉeĥa regiona gazetaro Vysočina News 6.10.

Zajímavosti sbírek kojetínského muzea - Babička Boženy Němcové v japonštině *(Interesaĵoj de la kolektoj de la Muzeo en Kojetín - "Avinjo" de Božena Němcová en la japan lingvo)*
*- Kojetínský zpravodaj 2020/12, p. 17 - pri la tradukisto-bohemisto Kurisu Kei*

Karolo Piĉ – centjara!  en La Ondo de Esperanto  6.12.

## 8. KRISTNASKO

Věra Ludíková - sonregistraĵo de ŝia novjara bondeziro "Betlehemo 2021"
en traduko de Margit Turková
Karel Čapek  - sonregistraĵo de "La Sankta nokto" el la "Libro de apokrifoj"
en traduko de Josef  Vondroušek
ambaŭ verkoj en interpreto de Pavla Dvořáková

**Aktualigo de la listo de kristnaskaj kantoj en Esperato** (el 13.12.2018)
entenas ankaŭ 12 nove aldonitajn kantojn

Ni atentigas i.a. pri la tute nova kortuŝa kanto **Kristnaska kanto de esperantistoj**
de Kaŝi (Carsten Schnackhorst , juna nevidanta esperantisot el Germanio)

## 9. REKOMENDATAJ INTERNACIAJ INFORMFONTOJ

- Libera Folio - sendependa movada bulteno: https://www.liberafolio.org
- Diverstemaj facillingvaj artikoloj kaj videoj : uea.facila.org
- Esperanta Retradio:  members.aon.at/aldone/retradio
  ĉiutage nova programo pri interesa temo (kun akompana teksto)
- Pola Retradio: pola-retradio.org
  ĉiun trian tagon preskaŭ duonhora programo

## 10. KAJ LASTE, SED CERTE NELASTVICE - KRONVIRUSO KAJ KOVIM 19

Daŭre validas la Aktualaĵo de la ĈEA- estraro  **Masko kun E-simbolo**!

Ĉu vi bezonas vortojn de subteno kaj esperigo en tiu ĉi malfacila tempo?
Jen  **POZITIVAJ KURAĜIGAJ MESAĜOJ POR VI**
de esperantistoj el la tuta mondo aperintaj 14.10.2020  en la *Festivala Kuriero*

**Konsiloj por malpliigi streson dum la krizo de KOVIM-19**  aperis en Uea.org

**Skribu al ni, kiel vi travivis tiun ĉi jaron, kion vi lernis kaj ekkonsciis dum ĝi kaj kiel vi sukcesis venki diversajn obstaklojn.**
**Vi povos partumi viajn spertojn en la 1-a numero de Starto.**
**Ni restu - kvankam dise - tamen kune ☺**

## 11. NOVJARA BONDEZIRO






*E-mentala Zamenhof-Festo en Prago 13.12.2020*

Karaj,  ni restadu en kontakto kun nia interna lumo, forto kaj amkapablo.
Ni ne lasu nin timigi per iu ajn kaj io ajn!
Io ajn venos en la sekva jaro, ni konservu prundenton kaj kuraĝon
kaj ni ne rezignu pri tio, kio por ni vere gravas!
Ni estu afablaj ne nur al niaj proksimuloj, sed  ankaŭ al ni mem
kaj ni zorgu aktive kaj multflanke  pri nia imunokapablo.
Kiel esperantistoj ni ne perdu esperon, sed ni ne nur sidu kaj atendu,
sed ankaŭ laŭ niaj ebloj ni faru ion por la bona fino!
Neniu alia tion faros anstataŭ ni ☺

---

*ĈEA-Retkomunikoj 2020 / 2.  Neregula interna periodaĵo.*
*Redaktas: Pavla Dvořáková*
*Kontakto: redakce@esperanto.cz,  cea@retkomunikoj.cz*